

“Literumiloj kaj Lingvohelpiloj”

unutaga kolokvo/ateliero

sabate 11 septembro 2010

ĉe IEL, Hago

Pri kio?

- ĉefe pri du *ne-komercaj* softvar-produktoj, konstruitaj kun multe da ambicio kaj helpe de subvencio (ESF) aŭ privata mono;
- en la kolokvo, la konstruantoj klarigas la defiojn, kiuj por la uzantoj ofte restis *malantaŭ la kulisoj*;
- la ateliero servos por montri diversajn specialaĵojn, ekzerci ties uzadon kaj pridiskuti eblajn plibonigojn.

Por kiuj?

- interesitoj-disvastigantoj: ekz. instruistoj, kiuj serĉas helpilon por siaj lernantoj;
- oftaj reviziantoj de longaj tekstoj: eldonistoj, redaktoroj;
- arĥivistoj, kiuj regule enskanas tekstoj el malnovaj libroj aŭ revuoj kaj volas pli efike kontroli la ciferegitan rezulton (kaj aŭtomate korektigi certajn skan-erarojn en ĝi);
- komputilistoj, kiuj jam uzis LINGVOHELPILO aŭ ESPSOF kaj ambicias kontribui al plua evoluigo de tiu (malfermitkoda) programaro.

La gvidantoj:

Marek Blahuš (1986), konata pro siaj gvid-aktivadoj en TEJO kaj E@I, kaj plurfoje premiita pro studmeritoj, specialiĝis pri komputila prilaboro de naturaj lingvoj. Lia bakalaŭra disertaĵo ĉe la Masaryk-Universitato (Fakultato de Informadiko) en Brno temas pri la konstruado de altnivela literumilo por Esperanto, kapabla pritrakti ankaŭ ties kompleksajn kunmetaĵojn. Samtempe, tiu verko de Marek, prezentita en Roterdamo (UK 2008), Berlino (GIL 2008) kaj Antverpeno (2009) estas bona trarigardo de ekzistanta literumil-programaro ĝenerale, kaj iel transpontas la dividlinion inter literumilo kaj gramatikilo.

Eckhard Bick (1958) jam jardekojn okupas sin profesie pri komputila lingvistiko. Li laboras kiel esploristo kaj projektgvidanto ĉe la Instituto por Lingvoj kaj Komunikado (ISK) de la Universitato de Suda Danlando. Specialiĝinte pri parsiloj kaj korpus-lingvistiko, li konstruis gramatiksystemojn por la portugala, la dana, la angla, la hispana, la franca, kaj Esperanto. Ekde 2008 li gvidas la plurjaran E@I-projekton LINGVOHELPILO, ambicia gramatikkontrolilo, je kiu ankaŭ Bertilo Wennergren kunlaboras. Eckhard prelegis pri la projekto dum UK 2008. Notinde estas, ke li sukcesis kompili la plej ampleksan korpuson (8 milionoj da tekstvortoj) iam en Esperantio.

Toon Witkam (1944) laboris en la softvar-industrio, ankaŭ pri komputila lingvistiko. En la 1980-aj jaroj li iniciatis esplorprojekton (DLT) por aŭtomata tradukado kun Esperanto kiel interlingvo.

Post 2001 emeritiĝinte, li komencis konstrui Esperantan vortstatistikan kaj tekstanalیزan softvaron, kun speciala atento por analizo de ne-envortaraj kunmetaĵoj. Pri tiu specialeco li prelegis en Vilno dum UK 2005 (Esperantologia Konferenco) kaj en Berlin dum jarkunveno 2006 de GIL (Gesellschaft für Interlingvistik). Ekde 2008 li faris sian tekstreviziilon ESPSOF elŝutebla kiel provversio, kaj pluevoluigis ĝin intertempe.

La programo:

Antaŭtagmeze: Enkondukoj

Ĝenerala superrigardo (Marek Blahuš)
Prezentado de LINGVOHELPILO (Eckhard Bick)
Prezentado de ESPSOF (Toon Witkam)

Posttagmeze: Ateliero
por maksimume 12 partoprenantoj
kun iliaj propraj porteblaj komputiloj,
sub gvidado de la enkondukantoj

Aliĝo:

Aliĝkotizoj: 75 eŭro (ĝis 30 aprilo 2010)
90 eŭro (ekde 1 majo 2010)
inkludas kafon/teon kaj lunĉon

Pagmanieroj

Poŝtbanko: konto 162626 nome de Internacia Esperanto-Instituto
Den Haag. IBAN: NL52INGB0000162626 – BIC: INGBNL2A.
Pagante el ekster la Eŭropa Unio, bv aldoni € 5,00 pro la
nederlanda poŝtbanka depreno.

Banko: RABO-Bank, konto 134753267 - IBAN
NL95RABO0134753267 – BIC RABONL2U.

UEA: nia UEA-konto estas iein-q. Pagante klare indiku la
numeron de via fakturo kaj sendu al ni kopion de la ĝirpeto.

Internacia Esperanto-Instituto
Riouwstraat 172
NL-2585 HW Den Haag
Nederlando
Telefono +31 70 3556677
iesperanto@versatel.nl
<http://www.iei.nl>